## 4. Fervojfakaj nocioj eligitaj el PIV, pro troa specialeco kaj netraktado en nia sekcio

**aerotrajno**
**fervoja**
**fervojo 2**
**frogplato**
**garaĝo 3**
**kapstacio**
**komutvojo**
**paktrajno**
**pertrami**
**platformo 4** (=trakbazo)
**subfervojo**
**subvojo 2**
**superfervojo**
**supervojo 2**
**surrelaĵoj** (ruliĝanta materialo)
**ŝnurvagono**
**trakbazo** (= platformo 4)
**trakcikapo** (en PIV-S)
**traklarĝo**
**trakmetisto**
**trameto**
**tramkondukisto** (eligo ne laŭ nia propono)
**tramvojo 2**

## 5. Terminoj anstataŭigitaj per aliaj

| PIV 1 | PIV-S | uzu laŭ PIV 2 |
|---|---|---|
| ~~aŭtotrajno~~ | ~~motortrajno~~ | ~~motorvagonaro~~ |
| **bufrobloko** | **bufrobloko** | trakfina baraĵo |
| **ĉizoji 3** | | kruciĝi |
| **deklivindikilo** | | deklivecindikilo |
| **ekspreso** | **ekspreso** | eksprestrajno |
| | **garaĝtrako** | parkotrako |
| **kablotramo** | | funikularo |
| **kajo 2** | | pasaĝerkajo |
| | **kaŭĉukkadro** | intervagona balgo |
| **klasifikejo** | | ranĝostacio |
| **komutisto 1** | | trakforkisto |
| **komutnadlo** | | nadlorelo |
| **kontraŭfrogo** | | frogalo |
| **lazarettrajno** | | vagonlazareto |
| **manĝovagono** | **rapidmanĝovagono** | bufedvagono |
| **nivelpasejo** | **traknivelpasejo** | traknivela pasejo |
| **nutra konduktilo 2** | | fidro |
| **pakaĵvagono** | | bagaĝvagono |
| **regadejo, trakregadejo** | | regejo |
| **semaforo 1** | | signalilo |
| **signalejo 1** | **signalejo 1** | (signalilregejo) |
| **tramisto** | | tramvojisto |
| **tramo 1** | | tramrelo |

# Terminara Kuriero

TeKu 118 Decembro 2002

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF
Gvidanto de Faka Komisiono:
Jan Uldal Niemann, Hovedvagtsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør
Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: esperanto@mail.dk
Sekretario de Terminara Sekcio:
D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul
Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

Karaj geamkioj,
ĉi tiu teksto estu tre konciza, por entute ne superi 12 paĝojn. En miaj manoj nun troviĝas ekzemplero de PIV 2. Por ke vi povu klare superrigardi ĉiujn fervojfakajn kaj plurajn najbarajn nociojn en ĝi, mi kompilis sekvan, pli ol 11-paĝan liston. La terminojn mi ordigis alfabete laŭ kompleta esprimo. Koncernaj kapvortoj estas aldonitaj parenteze. Post pluraj difinoj aŭ malpli precizaj eksplikoj troviĝas klariga noto, indikanta ankaŭ diferencon al nia propono. Je TeKu-fino mi aldonis nociojn kaj terminojn eligitajn el PIV 1 kaj ties suplemento. Metu ĉi tiun Terminaran Kurieron ĉe aliaj vortaroj; ĝi mem ja estas terminareto.
Mi ne volas prisilenti laŭdon fare de la ĝenerala gvidanto de la PIV-revizio, Michel DUC GONINAZ al nia sekcio. En antaŭparolo sur paĝo 21 li skribis interalie:

„ ... alvoko al kunlaboro estis farita ... al ... ĉiuj fakaj esperantlingvaj asocioj. ... El la ĉirkaŭ 50 fakaj asocioj respondis nur unu: I ... F ... E ... F, kies labormetodo montriĝis modela: ĝia terminara komisiono, sub la gvidado de Heinz Hoffmann, reviziis ĉiujn terminojn rilatajn al fervojo kaj prezentis sian laboron al la asocia kongreso por aprobo. ... "



Kvazaŭ kristnaska donaceto, ĉi tiu TeKu ne enhavas novajn taskojn. Ili aperos sekvontjare. Ĝuu trankvile kaj gaje la festotagojn, kaj transiru bone la sojlon al 2003.

Heinz Hoffmann

## 1. Ĉiuj fakaj nocioj kun FERVOJOJ-vinjeto

**arĉo**
2 Horizontala frota parto de kurentodeprenilo, uzata ĉe elektraj trakciiloj

**bagaĝvagono** (sub „vagono")
Vagono destinita por transporti bagaĝojn de pasaĝeroj

**balasto**
2 Ŝutaĵo (el ŝotro, gruzo, skorio kaj similaj) sub trako, kiu ricevas ŝarĝon de trakveturiloj pere de reloj kaj ŝpaloj, transdonas ĝin al subkonstruaĵo kaj samtempe amortizige kaj flekseble firmigas la trakon

**bloki** (sub „bloko")
4 Teknike malhelpi enveturon de trajno en sekcion ankoraŭ okupatan de alia trajno

**bloksekcio** (sub „bloko")
Kantono ekipita per bloksistemo
Noto: Komparu kun „kantono".

**bloksistemo** (sub „bloko")
Teknika aranĝo ĉe kantonigita fervojlinio por certigi sekuran senperan trajnsinsekvon
Noto: Komparu kun „kantonigo".

**boĝio**
Rulekipaĵo de trakveturilo, havanta plurajn radaksojn en turniĝpova framo

**bremsreĝimo** (sub „reĝimo")
Tuto de la kondiĉoj, karakterizantaj la funkciadon kaj efikecon de aerbremso

**bufedvagono** (sub „vagono")
Vagono ekipita por ebligi al pasaĝeroj rapidan manĝon

**bufro**
1 Aparato kun risortego, pare aŭ centre fiksita ĉe ambaŭ ekstremoj de trakveturilo, per kiu unu veturilo tuŝas alian kaj moderigas la kunpuŝiĝon

**dentrelo** (sub „relo")
Relo kun dentoj, meze en dekliva trako

**drezino**
Tri- aŭ kvarrada malpeza veturilo, kun movmekanismo aŭ motoro, destinita transporti sur reloj fervojan personaron aŭ fervojservan materialon

**eksprestrajno** (sub „trajno")
Trajno pli rapida ol ordinara, kun malpli da survojaj haltoj

**eltrakiĝi** (sub „trako")
Elsalti el la trako

**feruta** (sub „feruti")
Kamion-sur-vagona

**ferutado** (sub „feruti")
Transportado de kamionoj per surtraka ŝoseo

**feruti**
Transporti kamionojn aŭ remorkojn sur fervojaj vagonoj



**manovristo** (sub „manovri")
Laboristo, kiu efektivigas manovrotaskojn

**metropoliteno**
Metroo
Noto: La sinonimo estas enigita kiel nova kapvorto, sen propono de nia sekcio, verŝajne pro troviĝo de tiu vorto en filmo / literaturo.
Pri „metroo" vidu sub fakaj nocioj kun TRAFIKO-vinjeto.

**naveda** (sub „navedo")
2 Ir-reira
Noto: Rimarku la ŝanĝon de „navet-" al „naved-"!

**parki** (sub „parko")
(se paroli pri veturilo) Restigi provizore

**pramo**
Granda ŝipo, por transveturigi homojn, aŭtojn, vagonojn aŭ aliajn veturilojn
Noto: Okazis redakta eraro. PIV 1 ĝuste diferencigis inter „pramo" (boato), kaj „pramŝipo" (ŝipo). Nia difinpropono „Granda ŝipo ..." koncernis la terminon „pramŝipo", kiu ne plu troviĝas en PIV 2.

**signalo**
1 Interkonsentita signo, uzata por komuniki de malproksime averton, ordonon, informon
Noto: Komparu kun „signalilo" sub fakaj nocioj kun FERVOJOJ-vinjeto.

**stacidomo** (sub „stacio")
Domo, kie la pasaĝeroj atendas forveturon aŭ alveturon de trafikilo, aĉetas biletojn, deponas bagaĝojn ktp
Noto: Komparu kun „stacio 1" sub fakaj nocioj kun TRAFIKO-vinjeto, kaj kun „stacio 6" sub fakaj nocioj kun FERVOJOJ-vinjeto.

**subtrajno** (sub „trajno")
Metroo
Noto: Kontraŭ nia propono por eligi la nocion „subtrajno" (PIV 1: Urba subtera trajno), ĝi estas anstataŭigita per malĝusta sinonimo.
Pri „metroo" vidu sub fakaj nocioj kun TRAFIKO-vinjeto.

**surkaje** (sub „kajo")
Troviĝante sur kajo

**vagonlazareto** (sub „lazareto")
Vagongrupo, aranĝita por servi kiel hospitalo

**telfero**
Transportosistemo, ĉe kiu veturiloj aŭ seĝoj pendas ĉe ŝtalkablo kaj estas trenataj helpe de la sama aŭ alia kablo per loke fiksa movilo, por transporti pasaĝerojn aŭ kargojn al montoj kaj trans valoj
Noto: Komparu kun „funikularo".

**tramo**
Veturilo de tramvojo

**tramvojisto** (sub „tramo")
Ĉiu el la laboristoj, kiuj ebligas la ekspluatadon de tramvojo

**tramvojo** (sub „tramo")
Transportsistemo funkcianta laŭ relo/rado-principo, ĉe kiu limigita kineta energio ebligas veturadon sen sekuriga sistemo inter pluraj veturoj, precipe en surŝosea trafiko
Noto: Nia propono por deklari „tramvoj-" memstara radiko, ne estis akceptata.
Komparu kun „fervojo".

## 3. Komunlingvaj nocioj sen vinjeto, kiujn kuntraktis nia sekcio

**itinero**
1 Tutaĵo de la irotaj vojoj inter la deirpunkto kaj la celo de vojaĝo
Noto: Komparu kun „itinero 3" sub fakaj nocioj kun FERVOJOJ-vinjeto.

**kargadkajo** (sub „kajo")
Konstruaĵo kun surveturebla surfaco super traka aŭ ŝosea nivelo, por faciligi kargadon
Noto: La nocio „pasaĝerkajo" havas FERVOJOJ-vinjeton. Vidu tie.

**klasifiki**
3 = ranĝi
Noto: Nia propono por eligi „klasifiki 3", ne estis akceptata. Sekve restas la nedezirata sinonimo.
Pri „ranĝi" vidu sub fakaj nocioj kun FERVOJOJ-vinjeto.

**konduktoro**
Oficisto, kiu akompanas publikan veturilon (tramon, trajnon kaj simile), ne kondukante ĝin, sed plenumante difinitajn devojn, kiuj koncernas ĝian funkciadon aŭ ĝiajn pasaĝerojn

**kontaktolineo** (sub „lineo")
Elektra supertera lineo (nuda drato) por provizi kurenton al trakveturilo aŭ trolebuso per kurentodeprenilo

**linikapo** (sub „kapo")
Komenco aŭ fino de linio



**fridvagono** (sub „vagono")
Varvagono, destinita por la transporto de difektiĝemaj nutraĵoj

**frogalo** (sub „frogo")
Kompletigaĵo de frogo, konsistanta el du relpecoj fiksitaj ambaŭflanke de la frogo en malgranda distanco, sed sufiĉa, por ke la radflanĝoj trapasu

**frogo**
Centra parto de trakforko aŭ trakokrucaĵo, konsistanta ĉefe el du relpecoj, pintigitaj kaj kunigitaj en formo de V

**gvidrelo** (sub „relo")
Relo servanta ne kiel vojo, sed sole kiel gvidilo por pli da sekureco aŭ stabileco, fiksita flanke de rulrelo en distanco, por ke radflanĝoj trapasu
Noto: Komparu kun „kontraŭrelo".

**indikilo** (sub „indiki")
1 Montrilo: **videbla montrilo** (montrilo de mekanika signalilo)

**intervagona balgo** (sub „balgo")
Faldita aŭ elasta ekipaĵo ĉe ambaŭ ekstremoj de pasaĝervagono, ĉirkaŭkovranta la intervagonan pasejon

**itinero**
3 Sinsekvo de trakoj kaj trakforkoj en stacio aŭ disforkejo, por regulaj trajnoj aŭ manovraj veturoj
Noto: Komparu kun „itinero 1" sub komunlingvaj nocioj.

**kanguruvagono** (sub „vagono")
Varvagono, destinita por la transporto de duonremorkoj

**kantonigo** (sub „kantono")
Kreo, sur fervojlinio, de tiu veturadsistemo, kiu certigas sekuran senperan trajnosinsekvon cele al konservo de sama tempa intervalo inter du sinsekvaj samdirektaj trajnoj
Noto: Komparu kun „bloksistemo".

**kantono**
3 Sekcio de fervojlinio, kies aliro estas regata laŭ kantonigo
Noto: Komparu kun „bloksekcio".

**katenario**
Kontaktlineo ĉe elektraj fervojoj kaj simile, per kiu la elektra kontaktodrato estas pendigita kaj tenata je preskaŭ konstanta distanco disde la traknivelo

**komuti**
2 Ŝanĝi la pozicion de nadloreloj en trakforko, tio estas modifi trakforkon por direkti trajnon aŭ alian trakveturilon sur alian trakon

**kontaktrelo** (sub „relo")
Elektra konduktilo, konsistanta el metala relo lokita preskaŭ sur la sama nivelo kiel la rulrelo de elektra fervojo (metroo) aŭ tramvojo

**kontraŭrelo** (sub „relo")
Gvidrelpeco kun kurbigitaj finaĵoj, fiksita vidalvide al frogo kaj frogalo, por sekure gvidi la eksteran radflanĝon de radakso, kiam la interna radflanĝo preterpasas la breĉon inter frogo kaj frogalo

Noto: Komparu kun „gvidrelo".

**kuŝvagono** (sub „vagono")
Pasaĝervagono por dumnoktaj vojaĝoj

Noto: La eskpliko egalas al tio por „litvagono", kvankam „kuŝvagono" kaj „litvagono" ne estas sinonimoj.

**libera**
8 (se paroli pri spaco aŭ tempo) Ne prezentanta barojn, malhelpojn:
... **vojo libera** (inter du signaliloj)

**limprofilo** (sub „profilo")
Konturo de vertikala kversekco rilate al trakakso, difinanta la maksimumajn dimensiojn por trakveturiloj kaj ties kargoj, respektive la minimuman liberan spacon ĉirkaŭ la trako

**litvagono** (sub „vagono")
Pasaĝervagono por dumnoktaj vojaĝoj

Noto: La eskpliko egalas al tio por „kuŝvagono", kvankam „kuŝvagono" kaj „litvagono" ne estas sinonimoj.

**lokomotivo**
Surrele veturigebla trakcimaŝino, movata de vaporo, de dizelmotoro aŭ de elektro, servanta por translokado de vagonoj

Noto: Anstataŭ „dizelmotoro" tute ĝustas „brulgasa motoro", por ekzemple inkluzivi gasturbinan lokomotivon. Sed la frazoparto „movata de ..." estas superflua.

**manovri**
4 (se paroli pri trakveturilo) Veturi, ne kiel trajno, sed normalkaze nur interne de stacio, inkluzive de industritrakoj

Noto: Komparu kun „ranĝi".

**motorvagonaro** (sub „vagono")
Vagonaro enhavanta unu aŭ plurajn motorvagonojn

**motorvagono** (sub „vagono")
Vagono, provizita per propraj veturrimedoj



**deklivecindikilo** (sub „indiki")
Ŝildo apud fervojlinio aŭ ŝoseo, kiu montras, en kioma grado sekvas ascenda aŭ descenda parto

**fervojo** (sub „vojo")
Transportsistemo, funkcianta laŭ relo/rado-principo kun sekuriga sistemo pro atingebla granda kineta energio

Noto: Nia propono por deklari „fervoj-" memstara radiko, ĉar ne temas pri nura vojo, ne estis akceptata (paĝo 24 de PIV 2). Sekve restas la kaŝiteco sub „vojo".
Komparu kun „tramvojo".

**fervojisto** (sub „vojo")
Iu el la laboristoj, kiuj ebligas la ekspluatadon de fervojo

**finstacio** (sub „stacio")
2 Stacio ĉe fino de publika trafikilo (trajno, metroo, aŭtobuso kaj simile)

**funikularo**
Transportsistemo sur tre dekliva tereno, funkcianta laŭ relo/rado-principo, ĉe kiu specialaj vagonoj estas trenataj helpe de kablo per loke fiksa movilo

Noto: Komparu kun „telfero".

**kargo**
Tuto de la objektoj en unu transportujo (ŝipo, vagono, kontenero, kamiono kaj aliaj)

**magnetvojo** (sub „vojo")
Transportsistemo, kies veturiloj ŝvebas per magnetforto kaj estas movataj per lineara elektromotoro

Noto: Nia propono por deklari „magnetvoj-" memstara radiko, ĉar ne temas pri nura vojo, ne estis akceptata.

**metroo**
Fervojo por rapida pasaĝertrafiko en grandaj urboj kaj ties ĉirkaŭaĵo, kun linioreto plejparte subtera

Noto: Nia propono por aldoni la vortojn „aŭ supertera" je la difinfino, ne estis akceptata.
Kontraŭ la propono, estas enigitaj la sinonimoj „metropoliteno" kaj „subtrajno" sub komunlingvaj nocioj.

**stacio**
1 Grava haltejo de trafikilo (fervojo, metroo, ŝipo kaj aliaj) kun instalaĵoj por priservo de la pasaĝeroj

Noto: Komparu kun „stacio 6" sub fakaj nocioj kun FERVOJOJ-vinjeto.

**traknivela pasejo** (sub „pasi“)
Loko, kie vojo krucas trakon sur la sama nivelo

**trako**
**2** Konstrukciaĵo, konsistanta el reloj, ŝpaloj kaj akcesoraĵoj, servanta kiel vojo kaj gvidilo por veturiloj

**traksternado** (sub „sterni“)
Sternado de trako sur balasto

**tramrelo** (sub „relo“)
Kanelita relo uzata ĉefe en stratoj por tramvojoj

**transvagoniĝi** (sub „vagono“)
Ŝanĝi sian vagonon por alia

**turnoplato** (sub „plata“)
**1** Metala konstrukciaĵo surportanta relparon, turnebla ĉirkaŭ sia vertikala akso, uzata por turni trakveturilojn

**unurela** (sub „relo“)
Havanta aŭ uzanta unu solan relon

**vagonaro** (sub „vagono“)
Unuo, konsistanta el ĉiuj vagonoj de trajno; ĝi povas esti entrafikigita en trajno aŭ parkita

Noto: Post la PIV-revizio, nia sekcio decidis nomi tuton de veturiloj (unu aŭ pluraj) por komuna funkcio „kompleto“, do por tio ne uzi la vorton „unuo“.

**vagoneto** (sub „vagono“)
Malgranda vagono, por transporto de materialo en uzino, minejo kaj simile

**vagono**
Surrela veturilo, por transporti pasaĝerojn aŭ kargojn

**vartrajno** (sub „trajno“)
Trajno, transportanta nur varojn aŭ aliajn kargojn

**varvagono** (sub „vagono“)
Vagono destinita por transporti varojn kaj aliajn kargojn

## 2. Fakaj nocioj kun TRAFIKO-vinjeto, kiujn kuntraktis nia sekcio

**bagaĝo**
Tuto de aĵoj, kiujn kunportas aŭ ekspedas pasaĝero ĉe vojaĝo



**nadlorelo** (sub „relo“)
Ĉiu el la du moveblaj pare aranĝitaj partoj de relkomutilo, el kiuj unu devas dense tuŝi fiksrelon per sia pinta finaĵo por gvidi la radflanĝon al la ĝusta direkto

**pantografo**
**2** Kurentodeprenilo, uzata ĉe elektraj fervojoj kaj tramoj kun supertera kontaktolineo, konsistanta el artikigita mekanismo, kiu transmetas vertikalan premon al la frotpecoj

**parkotrako** (sub „trako“)
Stacia trako, sur kiu oni provizore restigas vagonojn aŭ trakciilojn

**pasaĝerkajo** (sub „kajo“)
Konstruaĵo kun surirebla surfaco super traka nivelo, por faciligi en- kaj elvagoniĝon

Noto: La nocio „kargadkajo“ ne havas vinjeton. Vidu tion sub komunlingvaj nocioj.

**pasaĝertrajno** (sub „trajno“)
Trajno, transportantaj nur homojn

**platvagono** (sub „vagono“)
Vagono sen superstrukturo, por la transportado de grandegaj kestoj, maŝinoj, aŭtoj kaj aliaj

**poŝtvagono** (sub „vagono“)
Vagono, aranĝita por kaj destinata al ordigo kaj transporto de poŝtaĵoj

**pulmano**
Luksa, tre komforta salonvagono

Noto: Nia terminpropono „pulman-vagono“ ne estis akceptata.

**radakso** (sub „akso“)
Kompleto el cilindroforma ŝtalstango kun du radoj fiksitaj en distanco inter si laŭ la ŝpuro

**ranĝi**
Apartigi kaj vicigi varvagonojn laŭ destino aŭ speco

Noto: Komparu kun „manovri 4“.

**ranĝostacio** (sub „stacio“)
Stacio aŭ staciparto en fervojnodo por ranĝi vagonojn de disigataj al formataj trajnoj

**regejo** (sub „regi“)
Loko, de kie specialisto regas trakforkojn, signalilojn, itinerojn, blokinstalaĵojn

**relbuso** (sub „buso“)
Aŭtobusforma leĝera motorvagono

**reldistanco** (sub „distanco")
Distanco inter la internaj kapsurfacoj de paralelaj reloj, inkluzive de gvidreloj
Noto: Komparu kun „ŝpuro 1".

**relkomutilo** (sub „komuti")
Parto de trakforko, konsistanta ĉefe el moveblaj pare aranĝitaj nadloreloj kaj fiksreloj

**relo**
**2** Longa ŝtala stango kun adekvata profilo, kiu portas kaj gvidas veturilojn

**relŝuo** (sub „ŝuo")
Metalobjekto analogforma al ŝuo, metebla sur relon por malakceli aŭ haltigi varvagonon ruliĝantan de ranĝmonteto, aŭ por malhelpi ekruliĝon de senmova vagono

**relvojo** (sub „vojo")
Bazelemento de relaj transportsistemoj, ebliganta veturilmovojn, konsistanta el subkonstruaĵo (talusoj, tranĉeoj, tuneloj ktp), surkonstruaĵo (balasto, trakoj, trakaparatoj) kaj pontoj

**restoracivagono** (sub „vagono")
Speciale ekipita vagono por tiuj servoj al la pasaĝeroj
Noto: La eksplikо egalas al tio por „salonvagono", kvankam „restoracivagono" kaj „salonvagono" ne estas sinonimoj.

**riglado** (sub „rigli")
Agado de tiu, kiu riglas: ... **riglado per alproksimiĝo** (aŭtomata procedo, per kiu, ĉe trakveturilo alproksimiĝanta al signalilo, ĉiuj regorganoj estas riglataj)

**rigli**
**2** Teknike sekurigi pozicion de trakaparato aŭ signalilo

**sablujo** (sub „sablo")
**1** Ujo, provizita per sablo, kiu laŭkomande ellasas ĝin sub la radoj de lokomotivo, por malhelpi la glitadon

**saktrako** (sub „trako")
Senelira trako
Noto: La propono, enigi la nocion, ne venis de nia sekcio.

**salonvagono** (sub „vagono")
Speciale ekipita vagono por tiuj servoj al la pasaĝeroj
Noto: La eksplikо egalas al tio por „restoracivagono", kvankam „restoracivagono" kaj „salonvagono" ne estas sinonimoj.



**signalilo** (sub „signalo")
Masto aŭ alia subportaĵo, ekipita per moveblaj brakoj (diskoj) kun lanternoj aŭ per diverskoloraj elektraj lampoj por signali tage kaj nokte
Noto: Komparu kun „signalo 1" sub komunlingvaj nocioj.

**stacio**
**6** Sekcio de fervojlinio, kie eblas gravaj influoj al trajnotrafiko (elvicigo kaj envicigo de trajnoj, komenco kaj fino de trajnkursoj kaj simile)
Noto: Komparu kun „stacio 1" sub fakaj nocioj kun TRAFIKO-vinjeto.

**surtraka ŝoseo** (sub „ŝoseo")
Trafikoferto por transporti kamionojn kun aŭ sen ŝoforoj per specialaj trajnoj kun tre malaltaj platvagonoj, por maldensigi surŝosean trafikon

**ŝpalo**
**2** Konstruelemento por trako, servanta kiel subportilo kaj distancigilo por la reloj, certiganta la ŝpuron

**ŝpuro**
**1** Distanco inter la internaj kapsurfacoj de ambaŭ paraj rulreloj de trako
Noto: Komparu kun „reldistanco".

**trajno**
**2** Vagonaro kun lokomotivo, motorvagonaro aŭ alia trakveturilunuo kun propra trakcio, entrafikigita sur unu aŭ pluraj fervojlinioj laŭplane aŭ laŭordone
Noto: Post la PIV-revizio, nia sekcio decidis nomi tuton de veturiloj (unu aŭ pluraj) por komuna funkcio „kompleto", do por tio ne uzi la vorton „unuo".

**trakcio**
La movo de trajnoj aŭ manovradunuoj per lokomotivoj aŭ per envagonaj motoroj
Noto: Post la PIV-revizio, nia sekcio decidis nomi tuton de veturiloj (unu aŭ pluraj) por komuna funkcio „kompleto", do por tio ne uzi la vorton „unuo".

**trakfina baraĵo** (sub „bari")
Fortika baraĵo, pleje trusforma, ĉe kapo de saktrako, por malhelpi al trakveturilo transveturi la trakfinon, kun aŭ sen bremsefiko

**trakforko** (sub „forko")
Aparato en trako por direkti trakveturilojn dumveture de unu trako al alia

**trakforkisto** (sub „forko")
Tiu, kiu regas kaj komutas trakforkon

**traknivela** (sub „nivelo")
Samnivele kun la trako